




Nº 06 - JUN/83

INFORMA BULTENO DE BRAZILA ESPERANTO-LIGO Boletim Informativo da Liga Brasileira de Esperanto Praça da República 54-29 andar - 20.211 - Rio de Janeiro-RJ BRASIL



IMPRESSO

STRATO " LAZARO ZAMENHOF " - Pelotas - RS

Laŭ Dekreto n-ro 76, de la 6-a de januaro 1983, la Urba Konsilantaro de Pelotas-RS., ŝanĝis la nomon de la strato "N-ro 10", kvartalo Navegantes II, al "Lázaro Zamenhof". La propono de tiu ŝanĝo estis prezentita de la loka leĝfaranto JOCARLI LOUZADA, kiu apogis la iniciaton de nia samideano Pedro Orestes Sorondo.

PLIA "STRATO ESPERANTO" - Lajeado - RS

Laŭ propono de la loka Delegito de UEA, S-ro Lenio Marobin, farita al la prezidan - to de la Urba Konsilantaro, D-ro Flávio Ferri, oni akceptis nomi straton en urbo LA JEADO (RS) " Esperanto ".

Tiu grava urbo situas en riĉa kaj tradicie Komerca, industria kaj kultura regiono de la ŝtato Rio Grande do Sul, kun 70 mil loĝantoj.

Salutojn akceptas peri la Delegito, S-ro Lenio Marobin, Caixa Postal 19, 95.000- La-geado-RS., Brazilo.

DUONHORA INTERVJUO PRI E-O EN RADIO KOPAKABANA-RJ

Dum la programo "Mesa Redonda" (Ronda Tablo) de Radio Kopakabana (RJ), la 20an de la numa monato, de la 9a kaj duono ĝis la 10a vespere, la prezidanto de BEL kaj Prof. - Sylla Chaves estos intervjuataj pri la internacia lingvo. Enkondukos la demandojn - nia samideano Joel Manso, redaktoro de la programp " UMA PONTE SOBRE O MUNDO" (PON- TO SUR LA MONDO), kiun ni prezentas ĉiuĵandude, en la sama radistacio, inter la - 11.25 kaj 11.30 vespere (loka horo).

PRELEGO ĈE UNIVERSITATA MEDIO-Rio de Janeiro-RJ

Pli ol cent universitatanoj kaj kelkaj profesoroj ĉeestis la prelegon faritan de Sino May Bijeleveld ĉe Sociedade de Ensino Superior Estácio de Sá (Societo pri Supera-Instruado Estácio de Sá), en Rio de Janeiro-RJ., la llan de la pasinta monato. La prezidanto de BEL persone konstatis la intereson de la ĉeestantoj pri la evoluo kaj perspektivoj de E-o. Tiu prelego estas ero de la plano, kiun samideanino May pacien ce kaj inteligente efektivigas por la enkonduko de E-o en la ĉi tiean universitatan medion. Aliajn informojn pri la imitinda agado de S-ino May vi trovos en la lasta bul teno de la Brazila Konsilantaro de Esperanto, kiu ĝentile publikigis raportan kunlaboraĵon senditan de ni pri la afero.

"KIO ESTAS ESPERANTO ?" - Afiŝo-disko-kurso

Pri tiu treege utila verko de nia S-âno Sylla Chaves, ni jam komencis legi la unuajn recenzojn. Ĉi-sube ni kopias parton de la teksto aperinta en Heroldo de E-o n-ro - 1713, de 10.05.83:

"La afiŝo, alloge presita, faldiĝas plurfoje. Ĝi havas, em 24 "paĝoj ", en la portugala, informojn pri Esperanto, la historion de la lingvo, gramatikon, iujn ekser cojn, vortojn de paroladoj kaj kantoj en la disko, bildojn de libro-eldonaĵoj, komen tojn de famuloj pri universala lingvo. Oni miras, kiel oni povis meti tiom da infor moj sur la afiŝon. La vortoj en la disko estas tre klaraj, inkluzive de tiuj en la tri kantoj; eĉ homo, kiu ne aŭdis Esperanton antaŭe, povas sekvi ilin legante la tekston. Oni ne lernos la lingvon de ĉi tiu "afiŝo-disko-kurso", sed kiel enkonduki lo ĝi estas tre bona. La aŭtoroj pretas helpi aliajn landajn organizaĵojn, se ili volos uzi ĉi tiun elegantan enkondukilon en ne-portugala lingvo. AMADOR DIAZ".

TURISMA AŨD-VIDA MATERIALO PRI BRAZILO

La entrepreno "V SON AUDIOVISUAIS E EDITORA LTDA." (Rio de Janeiro) baldaŭ eldonos bele gan skatolon kun 80 lumbildoj pri turismaj aspektoj de Brazilo. Akompanos tiun kolekton teksto surbendigita en 4/5 lingvoj. La estraro de tiu firmao akceptis la sugeston faritan de BEL, nome inkludi E-on inter la jam elektitaj lingvoj. Kompreneble, la Ligo mem zorgis pri la traduko kaj pri la elparolo de la teksto en E-o. Provizoran prezenta don de tiu materialo ni faris en nia sidejo, la 28an de majo lasta. Oportune ni sendos novajn informojn pri tiu eldonota materialo.

RADIAMATOROJ : ĜENERALA VOKO :

Ĉi-sube ni kopias opinion de nia S-ano OTTO VASKE (PY3ACE) el São Sebastião do Caí-RS: "BEL devus starigi kluban R-amatoran stacion por partopreni en la semajnfina VERDA-RON-DO, je la 20,30 GTM, frekvenco 14.266 kHz. Ĉiam renkontiĝas argentinaj, brazilaj kaj eŭropaj samhobianoj."

La ideo ŝajnas al ni tre interesa. Do, ni petas al la radiamatoroj loĝantaj en Rio de Janeiro, ke ili detale ekzamenu la eblecon starigi kluban R-amatoran stacion ĉe ni. Ni atendu sinprezenton de volontuloj kapablaj zorgi pri tiu afero.

Ni uzas la okazon por informi al ĉiuj radiamatoraj s-anoj, ke ni estas pretaj aperigi en niaj bultenoj notojn pri tiu faka agado. BEL vokas ĉiujn lokajn radiamatorojn...kaj aŭskultas :

ITABUNA ESPERANTO-ASOCIO-BA. Nova Estraro

La 16an de aprilo lasta estis elektita kaj enpostenigita la nova estraro de Itabuna Esperanto-Asocio: Prezidanto-Prof. Aderaldo Rocha, Vicprez, - Hilmar Ilton Santana Ferreira, la Sek-Otávio de Souza, 2a Sek-Margarida da Mata Virgem, la Kas.-Manoel Otavia no dos Santos, 2a Kas.-Prof. Hermita Alves Santos, Bibl.-Antinio Daniel Cordeiro Alexan drino, Dir. pri Disvastigado - Prof. Manoel Teixeira Santos. La Asocio funkciigas Esperantan kurson, dimanĉe, de la 9a ĝis la lla matene, kaj marde kaj ĵaŭde, de la 8a ĝis la 10a vespere, ĉe strato Rui Barbosa n-ro 23, Itabuna-BA. Gratulon al la novaj estraranoj kaj dankon pro la informoj senditaj: Feliĉon kaj sukceson:

KLUBO ESPERANTISTA ZAMENHOF - Belém-PA - Reaktiviĝo

"LA VERDA PAPAGO", oficiala bulteno de Klubo Esperantista Zamenhof (n-ro Ol, Marto / Aprilo / Majo) ĵus aperis. Pere de ĝi ni eksciis pri la elekto de jena nova estraro : Alberto Milhomens (prez.), Odilia Milhomens (vicprez.), Ramiro Castro(là Sek.), Jorge - Elarrat (2a Sek.), Wanderley Ichihara (la Kas.) kaj Nazareno Salgado (2a Kas.) Kultura Kons. : Evaldo Regulla, Ribamar Azevedo kaj Euclides Caripuna Soares.

BEL gratulas la gvidantojn de KEZ kaj deziras al ili plenan sukceson en tiu nova kaj - promesplena fazo de la societo.

ĴURNALISMA AKTIVADO EN URBO SÃO LUÍS - MA

Samideano Gilson Passos, loĝanta nuntempe en S.Luís (MA), afable sendis al ni la ĵurnalon "O IMPARCIAL ", de la 3a de aprilo lasta, kiu enhavas tre interesan artikolon de li redaktita, sub la titolo ESPERANTO, A PORTA DO SUCESSO (Esperanto, la enirejo por la sukceso). Pro manko da spaco, ni nur reliefigos la informojn, kiujn S-ano G. Passos diskonigis post la fino de la artikolo mem. Li klarigis, ke la ĵurnalo konsentis perio de publikigi artikolojn kaj novaĵojn pri E-o. Finfine li prezentas la titolojn de la aperontaj temoj, kiujn li bonege elektis: I. Lingvo Internacia E-o; II. Kongresoj de E-o; III, Kial oni devas lerni E-O?; IV. La kultura valoro de E-o; V. Associação de E-o do Maranhão; VI. 16º Brazila Seminario E-o; VII. Opinioj pri E-o; VIII. E-o frontas barojn; IX. L.L. Zamenhof - lia vivo, liaj verkoj; X. Esperanta Gramatiko. Adreso de la ĵurnalo: O IMPACIAL - Rua Formosa 46, Caixa Postal 1117, 65.000 - São Luís - MA.

SES-HORA ESPERANTO - KURSO

Sylla Chaves provos sian novan aŭdvidan metodon por rapide komprenigi skribitan kaj - parolatan E-on. Lia provkurso funkcios en la 16a Brazila Seminario de E-o, en Ouro Pre to-MG., en la tri matenoj de ĵaŭdo (21), vendredo(22) kaj sabato(23) de julio ek de la 9a horo matene. Pliaj detaloj kun KKE.

EKSPOZICIO DE AFIŜOJ PRI INFANOJ

Nome de BEL, ĝia anino Izabel Cristina Santiago organizas ekspozicion de plurlandaj afi ŝoj pri infanoj, kaj jam komencis kolekti ilin. ĉu vi povas helpi ? Ĉiuj porinfanaj - afiŝoj estas bonvenaj, precipe tiuj pritraktantaj infanaj rajtoj al amo, edukado, libero, sano, kaj tiel plu. Al la afiŝoj oni petas aldoni la E-an tradukon de iliaj tekstoj kaj informojn pri la jaro, motivo kaj celo de la eldono. Bonvolu sendi vian kontribuon al la adreso de BEL.